# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 1. No. 3 | DECEMBRO 1948

Al la legantaro de „Esperanto-Servo" la redakcio deziras feliĉan novan jaron!

## ĈEĤOSLOVAKA REGISTARO APROBIS LA UNUAN BUDĜETON POR LA UNUA JARO DE LA 5-JARA PLANO




*La venkinta emblemo de la 5-jara plano. (Proponis akademia pentristo A. Zábranský.)*

La 21an de decembro 1948 kunvenis ĉs. registaro por pritrakti la budĝeton por la unua jaro de la 5-jara plano kaj por aŭdi la raporton de la ĉefministro Ant. Zápotocký, kiu prezidis la kunvenon. Laŭ la propono de la ministro por informoj kaj klerigo Václav Kopecký estis akceptite sendi esprimojn de la dankoj al generalissimo Stalin, ke li montris multe da kompreno por la bezonoj de la ĉeĥoslovaka popolo dum la konstruado de Ĉeĥoslovaka respubliko, precipe por la 5-jara plano. Same li proponis sendi la dankojn al la respublika prezidento Klement Gottwald, kiu dum sia lasta restado en Krim preparis la kondiĉojn en Sovetunio, ke tiu ĉi multe helpu plenumadi la laboron de la ĉs. popolo dum la plenumado de la 5-jara plano de ČSR. Unue prezentis la ĉefministro Antonín Zápotocký la raporton pri la traktado en Moskvo, kiun partoprenis la ĉs. registara delegacio, gvidita de la ĉefministro. Li diris, ke Sovetunio pruntos al ni pezajn valutojn, oron, konstruos al ni multajn fabrikojn, necesajn por la plenumado de la 5-jara plano kaj fariĝos nia plej ĉefa aĉetanto al nia varo, fabrikota dum la 5-jara plano.

En la plua parto de la kunveno oni parolis pri la investado en la jaro 1949. La investoj por la ŝtata administrado postulos 8.357,242.000 Kčs, por la investopruntoj estas budĝetita sumo 7.868.125.000 Kčs; por la kovro de la ŝtata ŝuldo kiel ŝtata kontribuaĵo estos disponebla 3.039 148.000 Kčs, la kontribuaĵoj al la popola administrado de komunumoj estos kovrota en la jaro 1949 7.327,180.000 Kčs kaj por iliaj specialaj bezonoj oni budĝetis sumon 5.029,000.000 Kčs. En la sumo de la atendataj enspezoj oni taksas la enspezon de 7.463,634.000 Kčs, kiujn donos al la plano la ŝtataj entreprenoj. La budĝeta sumo por la investado de la ŝtataj entreprenoj estas kalkulita je 11.233,745 000 Kčs.

En la proponon de la budĝeto ne estas enmetitaj la sumoj de la ekonomia rezulto de la naciaj entreprenoj, escepte de la naciaj bankoj. La budĝeto estas farita tiel, ke ĝi plene respondu la normojn, donitajn de la ĝenerala sekretariejo de la ekonomia konsilantaro. La ŝtata budĝeto estas unueca por la tuta ŝtata teritorio kaj estas dividita je tri partoj t. e. ŝtata administrado, administrado al la ŝtataj entreprenoj kaj la administrado al la ŝtata ŝuldo. Samtempe la budĝeto de la ŝtata administrado estas la ĉefa budĝeto (ĝenerala), ĉar al ĝi kontribuas la ceteraj partoj de la budĝeto: la ŝtataj entreprenoj kal la ŝtata ŝuldo. Plue la budĝeto enhavas la enspezojn kaj elspezojn, dividitajn aparte je la centraj kaj je la landoj ĉeĥaj kaj aparte je Slovakio kaj krom tio je la en-kaj elspezoj de la ministerioj kaj oficoj, al ili egalecaj. Tio signifas, ke la budĝeto por la jaro 1949 signifas jam la unuan gravan kaj praktikan paŝon, celantan la deburokratiigon de la ŝtata administrado dum la plenumado al la 5-jara ekonomia plano de ČSR. Oni diras: komenco bona, laboro duona. Tial tuj komence de la plano oni devas zorgi ekonomiigi la produktadon kaj la taskojn proporcie distribui. La industrio devas dum la 5-jara ekonomia plano plialtigi la produktadon je 57%, sed en la jaro 1949 la produktado de industrio devas plialtiĝi je 16.8%, do tiu ĉi kvoto de la plano estas pli alta ol unu kvinono. Oni decidis komenci tiel, por povi fabriki la industriaĵojn, bezonajn por la plua plenumado al la plano, ĉar la rezultoj de la jaro 1949 tuj estos uzitaj por la plua planita laboro. Sektoro agrikultura, kompare kun la jaro 1948, devas plialtigi la produktadon je 6.9%. En la sektoro domkonstrua oni atendas plialtigon je 32%, kio estas ankaŭ pli ol unu kvinono el la tuta dom-konstrua plano, fiksita per 130% ĝis la fino de la 5-jara plano. La ĉs. trafiko antaŭvidas dum la 5-jara plano plialtigon al la trafikrezultoj je 35% kaj en la jaro 1949 ĝi devas esti 8%. La kvoto de la konsumaĵoj por unu persono estas planita per plialtigo je 35% kaj por la jaro 1949 ĝi estos jam 12%. Sed samtempe la budĝeto akcentas, ke por povi plene kaj sukcese plenumi la 5-jaran planon de la ekonomia rekonstruo de l'respubliko, oni devas malkovri ĉiujn kaŝitajn laborrezervojn. Administri la budĝetojn en la komunumoj multe helpos la nova formo de la regionaj komitataroj, kiuj komencos labori la 1-an de januaro 1949. Ankaŭ la financoreferentoj komencos funkcii de la 1-a de januaro 1949. Ili prilaborados tiujn taskojn, kiujn ĝis nun faris la landaj financdirekcioj kiel la oficoj de la dua grado, kiuj prilaboris la impostojn, diversajn kontribuaĵojn kaj zorgis pri la ĝustatempa pagado al la ŝtato. La precizajn taskojn de la financreferentoj en unuopaj regionoj publikigos la financministro en la oficiala bulteno. La registaro traktis ankaŭ pri la rekompenco por la lokaj naciaj komitatoj kaj oni decidis, ke estu donita rekompenco al tiu komitatano, kiu pro la plenumado de la taskoj en la komitato perdas la eblecon praktiki sian okupon privatan. La registaro decidis ankaŭ, ke la personoj, kiuj servas kiel militistoj kaj estas ŝtataj aŭ komunumaj dungitoj, respektive iliaj familianoj, ricevu plenan salajron; krom tio ankaŭ unuopaj specifitaj privataj entreprenoj devas daŭrigi la pagadon de la salajroj al personoj (iliaj dungitoj) militservantaj.

Plue la registaro decidis, ke la legomo estos libere vendata kaj same la fruktaro. Nur bulbo restos varo porciumita je kuponoj. Plue la registaro decidis pri la novaj prezoj de la biero, kiu kostos depost la 15-a de januaro 1949 dum la vendado ekster la gastejo 7 Kčs por unu litro de 7 grada biero. La 8 grada biero de Plzeň kostos en Plzeň kaj ĝia ĉirkaŭaĵo 8 Kčs.

Plue la ministrino por la publika nutrado Inĝ L. Jankovcová raportis en la registara kunveno, ke la porciumoj de pano, viando kaj graso k. t. p. por la venonta jaro estas garantiitaj por ĉiu civitano de ČSR. La registaro plue decidis, ke la krompagoj, kiujn enspezas la laborantoj, pro tio ke ili diligente plenumas la planon, ne estos impostitaj ĝis la jaro 1950. La registaro aldonas, ke la laborantoj multe respektos tiun ĉi aranĝon kaj per sia diligenteco helpos plenumi la taskojn, donitajn per la 5-jara ekonomia plano de ČSR.



## ĈEĤOSLOVAKA MINISTRO DRO VLADO CLEMENTIS

*en ekonomia komisiono de Unuiĝintaj Nacioj kontraŭ la ekonomia diferencigado.*

La ĉeĥoslovaka ministro por eksterlando Dro Clementis parolis kelkfoje en la lasta konferenco de Unuiĝintaj Nacioj. Parolinte en la ekonomia komitato li tuŝis precipe la influon de Usono je la ekonomia vivo de l'eŭropaj ŝtatoj. La ministro citis tekstojn de la Atlantika kaj Havana interkonsentoj, laŭ kiuj devas esti garantiata al ĉiuj ŝtatoj — ĉu grandaj, ĉu malgrandaj — la partopreno je komercado kaj alireblo al ĉiuj mondaj surogatfontejoj, kiujn ili bezonas por sia ekonomia prosperado. La komisiono por ekonomiaj demandoj en Unuiĝintaj Nacioj opinias laŭ siaj postmilitaj spertoj, ke oni agu laŭ la principo prerogativi la landojn, ruinigitajn de la milito. Al ĉi tiuj ŝtatoj estis ebligota la akiro kaj ekipo de nova maŝin-establo, inkluzive de agrikulturaj maŝinoj, rezervaj maŝinpartoj k. t. p. La komisiono plue rekomendis, ke la membraj ŝtatoj, havantaj konforman produkt-kapaciton, liveradu al la landoj, trafitaj de milito, precipe la instalajon, necesan por forigi la unuajn malfacilaĵojn.

Ministro Clementis plue en sia parolo akcentis, ke la reprezentantoj de Usono longe proklamadis du principojn, kiujn ili opiniis fundamentaj por la internacia politiko, nome ke ne ekzistu ekonomia diferencigo inter ŝtatoj kaj ke iliaj komercrilatoj estu multflankaj. Usono ankaŭ akcentis ĉe ĉiu okazo, ke la landoj direktu sin ekskluzive per konsideroj komercaj, neniam per politikaj aŭ aliaj. „Tio ĉi estas la tiel nomata ekonomia evangelio, kiun la amerikaj misiistoj predikis al la ekonomiaj „idolanoj", daŭrigis la ministro. „Sed nun ni atentu, kiel la afero montriĝas en praktiko! Usono ekkomencis apliki sian novan ekonomian politikon, kaj Ĉeĥoslovakio havis la honoron esti la unua lando, eksentinta la esploron de tiu ĉi nova politiko. Kaj la 13an de aŭgusto 1946 laŭ la ordono de tiama ŝtata sekretario Byrnes estis haltigita la jam aprobita kredito al Ĉeĥoslovakio. Sekve de la nova orientiĝo, komencis Usono la 30an de decembro 1947 denove kontrolon al eksporto preskaŭ same severe kiel dum la milito. Nia propra sperto", diris ministro Clementis, „devigas nin laŭvere diri, ke la esploro al eksporto en orientan Eŭropon estas efektive tre detala, ĉar el cent postuloj pri eksportpermeso ni atingis nur kelkajn, kiuj koncernis la eksporton de negravaj varoj en Ĉeĥoslovakion. La koncernaj korporacioj en Usono, iam akceptintaj niajn mendojn kaj multfoje ankaŭ antaŭpagojn, ne povas nun efektivigi la liveron, kaj tiel estas Ĉeĥoslovakio iĝrade nun kreditoro de Usono".

La ministro plue menciis la elturniĝon de Usono, kvazaŭ ĝia eksterlanda komerco estus direktata je la vidpunkto de la ŝtata sekureco. Laŭ la praktiko de usonaj eksport-permesoj, oni devus opinii, ke la sekureco de Usono estas minacata ankaŭ per tio, ke oni liverus en Ĉeĥoslovakion aluminiajn foliojn por enpaki nutraĵojn k. s. Rilate al tio proklamis Dro Clementis, ke la ĉeĥoslovaka popolo ne deziras militon, ne kredas la eksplodon de la milito kaj la konstruo de Ĉeĥoslovakio direktiĝas al la nelimigita kunlaboro kun ĉiuj landoj. Ĉeĥoslovakio pruvis tion ankaŭ per tio, ke ĝi antaŭ nelonge devoligis sin liveri al okcidenta Germanio grandan kvanton da fervoja materialo, dum Usono en la intereso de sekureco rifuzas liveri al Ĉeĥoslovakio fandfornon por la ŝtata monerstampejo en Kremnice.

En la fino de sia parolo okupis sin la eksterlanda ministro pri neceso interŝanĝadi la varojn inter la eŭropaj ŝtatoj. La landoj de la tiel nomata Marshall-plano povos importi la varojn el la dolara teritorio nur en valoro de kvin miliardoj da dolaroj, la aliajn bezonaĵojn en valoro de 9,5 miliardoj da dolaroj ili devos importi el aliaj lokoj, precipe el ceteraj eŭropaj landoj. La agado de Usono kontraŭas la vivinteresojn de l'eŭropaj landoj, ĉar ĝi malhelpe tuŝas per siaj duflankaj kontraktoj kun la landoj de Marshall-plano la reciprokan komercon de eŭropaj ŝtatoj.

Ĉeĥoslovakio komprenéble penas disvastigi siajn komercajn rilatojn kun la landoj de plana ekonomio, ĉar la planado defendas ĝin kontraŭ grandaj ekonomiaj skuoj, krizo kaj senlaboreco. Ĉeĥoslovakio pruvas sian penadon komerci kun ceteraj landoj per tio, ke ĝi eĉ

### DUM LA 5-JARA PLANO DE ČSR ESTOS DRENOTAJ 10.000 HEKTAROJ DA GRUNDO.

Oni planas ne sole la akvigon al la grundo, sed ankaŭ ĝian deakvigon, kie ĝi montriĝas necesa. Precipe la kunfandigita agrikultura kamparo, deakvigota, povas esti plugata kaj erpata maŝine kaj per la maŝinoj la laboro sur la kamparo pliboniĝos, kion nature influos ankaŭ la pli efikan rikoltadon.

Per la plibonigo al la digoj kaj riverbordoj ni sekurigos la kampojn, troviĝantajn laŭborde de la riveroj, kaj la 5-jara plano antaŭvidas la sekurigon de la agrikulturaj grundoj kontraŭ la ĉiujaraj superakvigoj.

### KRISTNASKO EN ĈEĤOSLOVAKIO ESTIS FESTOTAGO DE LA TUTA POPOLO.

La ministrino por la publika nutrado Inĝ. Ludmila Jankovcová ordonis prepari kristnaskajn paketojn, kiuj estis vendataj po Kčs 600 k. 400. En la paketoj estas 1 kg da sukero, ¼ kg da bakaĵoj bongustaj, 20 gr. da teo, 1 litro da rumo, 200 gr da sekvinberoj aŭ migdalo. Aŭ oni povas en la paketo havi nur ½ litron da rumo sed ¼ kg da butero, 2 kg da faruno, ¼ kg da legumenozo, ½ kg da pomoj, 200 gr da rizo, 70 gr da sukeraĵoj. La prezo de la paketoj estas sufiĉe alta, sed oni scias, ke nur tiamaniere estis eble garantii al ĉiu familio kelke da tiaj paketoj, ĉar alie la akaparistoj povus dum la kristnaska semajno eluzi la aĉetdeziron por siaj nigraj celoj. Tiamaniere povas ĉiu familio aĉeti la paketojn en la butikoj kaj la mono enspezita por la paketoj revenas el la ŝtata kaso en alia formo denove al la publiko. Tiu ĉi aranĝo de la registaro estis tre bona, ĉar la kristnaska tablo en ĉiu familio pliriĉiĝis. Flustriloj demandis, kie estas la varo, promesita de la registaro fine de la dujara plano. Jen ili vidis, ke la registaro plenumis sian promeson kaj ke oni tamen povis plibonigi la nutradon de la publiko. La paketojn povas ĉiu aĉeti, ĉar ne estas en Ĉeĥoslovakio homoj, kiuj estus sen la salajro. En Ĉeĥoslovakio ne estas senokupitaj homoj, ĉar la konstitucio garantias al ĉiu homo la okupon. En la paketoj estis ankaŭ la brazila kafo, kiun la ĉsl. registaro tie aĉetis.

### BRITA DEPUTITO S. SWINGLER: LA ĈEĤOSLOVAKA POPOLO FORTE SUBTENAS SIAN REĜIMON.

La plej juna deputito de Labour Party kaj honora sekretario de Brita-Ĉeĥoslovaka Ligo en Anglio Stephan Swingler venis antaŭ nelonge Ĉeĥoslovakion por informiĝi pri la situacio en minejoj, nacia asekuro kaj pri la junular-demandoj. En kunveno kun Praha'aj ĵurnalistoj li parolis pri siaj impresoj el Ĉeĥoslovakio. Li diris, ke lia plej grava konstato el lia vizito en Ĉeĥoslovakio estas la konvinkiĝo, ke Ĉeĥoslovakio ne estas vasalŝtato de Sovetio, sed ke la amikeco kaj intereso de l'popolo al Sovetio estas sekvo de dankemo por liberigo al Ĉeĥoslovakio. Koncerne la brita-ĉeĥoslovakan interrilaton li diris, ke en iuj anglaj medioj oni kredas, ke Ĉeĥoslovakio havas kontraŭ-britajn opiniojn. „Mi konstatas, ke tio ne estas vero, mi ja ĉi tie renkontiĝis kun granda intereso al Grand-Britio. Precipe la laboruloj havas amikajn rilatojn kun la laboranta popolo en Anglio".

nun provizas la okcidentan Eŭropon per varoj senkondiĉe bezonaj kaj faras tion eĉ ĉe la plej alta strečado de siaj fortoj.

Laŭ la vortoj de ministro Clementis estas la eksterlanda komerco de Ĉeĥoslovakio karakterizata per granda disvastigo de komercaj interligoj en la tuta mondo. Fine konstatis Dro Clementis, ke la duono de ĉeĥoslovaka eksterlanda komerco rilatas al la tiel nomataj okcidentaj ŝtatoj. Se ili ne faros diferencigon kontraŭ Ĉeĥoslovakio, do ankaŭ Ĉeĥoslovakio ne havas intencon fari diferencigon kontraŭ ili.

## IDEO, KIU TROVIS EĤON EN LA TUTA POPOLO DE ĈEĤOSLOVAKIO.

Iniciate de la respublika prezidento Klement Gottwald, la registaro aprobis lian deziron, ke la verkoj de la plej granda verkisto de Ĉeĥoslovakio Alois Jirásek estu eldonitaj amase kaj malkare, por ke la tuta popolo havu liajn verkojn en siaj privataj bibliotekoj kaj tiuj ĉi libroj de Jirásek estu dispone al ĉiuj publikaj bibliotekoj, kiuj estis dum la okupado multe detruitaj kaj kie speciale la verkoj de Jirásek estis tiam nuligitaj. Tiun ĉi deziron, eldonadi malkare la verkojn de la granda ĉeĥa verkisto, akceptis ĉe la respublika prezidento ĉeestantaj ministroj Dro Zdeněk Nejedlý kaj Václav Kopecký kaj promesis lian planon plenumi. Estas sen kia ajn dubo, ke verkisto Jirásek apartenas al la glora plejado de la genioj de la nacio, al komponisto Bedřich Smetana, pentristo Mikoláš Aleš, Božena Němcová kaj multaj aliaj. Dro Nejedlý, la ministro por instruado diris, ke la verko de Jirásek priskribas grandan parton de la batalo, kiun la ĉeĥa kaj slovaka nacioj dum jarcentoj devis batali kontraŭ la invadintoj, kaj ke Jirásek disponigas al la legantoj gloran epokon de la nacio kiel ekzemplon de ĝia kapableco regi siajn aferojn, kiel ĉiu liberecon amanta nacio. „Tial ni volas sekvi la tradicion de Jirásek", diris la respublika prezidento Klement Gottwald, esprimінte sian deziron. „Ĉar nia popolo plene lin komprenas kaj al tiu ĉi popolo estas Jirásek multe pli intima ol li estis al la kapitalista klaso en nia lando, kiu ja la librojn de Jirásek legis, sed laŭ liaj vortoj ne kondutis, amikiĝinte kun la plej granda malamiko de la ĉs. popolo".



## ZAMENHOF-FESTO

La 15an de decembro okazis en multaj grupoj de la ĉs. esperantistaro solenaj vesperoj honore al la datreveno de naskiĝtago de nia kara majstro L. L. Zamenhof, kiu estus nun 89-jara.

Sed la plej solena artista vespero okazis en Praha en la granda halo de la Slava domo. Tie la artistoj de Verda Stacio aktoris, kantis kaj ludis kun granda sukceso. La artistino Zdenka Švabíková montris sian scion de la sperta aktorino, bela koloratura voĉo de la opera kantistino Věra Jindřichová prezentis la delikatecon de sia kantista arto, artistino Zdeňka Procházková recitis per deklamada scio kiel denaska esperantistino, profesorino Marie Knotková, fame konata virtuozino je fortepiano, ludis parkere klasikan muzikon kaj montris sian grandan scion de la tekniko. Membro de la Nacia teatro en Praha Karel Höger prelegis modele, ja genie, tian esperanton, kian scii estu deziro de ĉiu esperantisto. Josef Bartoš, tenoristo de Radio-Praha, refreŝigis la belecon de la naciaj kantoj, tradukitaj en Esperanton. Fraŭlino Nývltová per sia danceto tre plaĉis.

Samtempe okazis en Praha seminario de la regionaj delegitoj el Bohemio kaj Moravio. Venis pli ol 220 delegitoj jam la 14an de decembro kaj ili restis en Praha ĝis la 18a de decembro, absolvinte 19 prelegojn de la multaj eminentuloj de nia publika, kultura, ekonomia kaj politika vivo. La seminario estis tre grava aranĝo, ĉar tie la delegitoj de EAĈSR povis aŭdi la opiniojn pri Esperanto de la unuopaj prelegintoj. Precipe plaĉis du prelegoj de la ministeria departementa estro P. Konečný el la ministerio por informoj kaj klerigo, kiu en sia parolo akcentis, ke la ĉs. esperantista movado povas bazi sian laboron sur la tradicio ĉeĥa, sur la ideo de la granda Ĉeĥo, instruisto de la nacioj Jan Amos Komenský (Comenius). La prezidanto de la EAĈSR A. Malík prelegis pri la nova formo de nia esperanto movado, kiu devas esti ne nur laboro per esperanto al esperanto, sed per esperanto al la plej aktualaj aferoj de nia epoko t. e. paco, progreso, socialismo.

Estis aprobite fari rezolucion, kiu estos dissendata al ĉiu esperantista grupo en la mondo kaj al multaj unuopuloj. Samtempe estis aprobita la propono, ke la unua postmilita tutŝtata kongreso de la ĉsl. esperantistaro okazu la 4an ĝis la 6-a de junio 1949 en la industria ŝtatlima urbo Liberec.

## KRISTNASKA MISIO DE PREZIDANTO DE LA ĈS REGISTARO A. ZÁPOTOCKÝ:

„*La paco benu vin ĉiujn*, homoj de bona volo, kiuj post finita ĉiutaga laboro kaj post la plenumo de viaj taskoj amasiĝis sub la kristnaska arbo en la rondo de viaj karaj ĉe la kristnaska vespermanĝo". Per tiuj ĉi vortoj parolis la prezidanto de l'ĉs. registaro Antonín Zápotocký al ĉiuj civitanoj de la Ĉs. respubliko okaze de la kristnaska tago. Li rememoris la pasintan jaron, dum kiu la popolo ege kaj sukcese laboris, por forigi la postsekvojn de la detruiga antaŭnelonga mondmilito, kiun kreis la atakema ĉiongluitanta germana faŝismo kaj la tutmonda reakcio. Kaj li rememorigis, kiel la ĉs. popolo energie eksilentigis kaj forpelis tiujn, kiuj volis la bonan volon kaj laboremon de la nacio disfaligi kaj kiuj man-en-mane spekulaciis igi novan militon. „Ni povas do la nunan kristnaskon festi pace kun ĝojo kaj espero, ke ni defendos la pacon por la estonteco, en kiu sukcesos la packonstrua laboro, kaj ke ni la pli ĝojan vivon plene garantios. Tiuj ĉi panikuloj minacis la popolon per nova milito. Nenio el iliaj fiprofetaĵoj efektiviĝis. La milito ne ekestis kaj ni firme kredas, ke ĝi ne ekestos. La popoldemokratiaj fortoj kaj la fortoj kontraŭmilitaj de jaro al jaro multnombriĝas", diris plue la ĉs. ĉefministro Zápotocký. „Ili scias, ke nesufiĉas la pacon deziri, ĝin sopiri, ĝin preĝopeti, ili scias, ke la pacon oni devas unuavice celkonscie konstrui kaj ĝin defendi. La planojn de la militprovokistoj oni devas ĉiam kaj ĉie nuligi, batali kontraŭ ili. Tion ĉi sukcese faras unuavice nia granda aliancano Sovet-Unio, kies ŝtatlimoj ĉirkaŭbrakas pli ol unu sesonon de la mondkontinento. Ĝia reprezentanto Andrej Vyŝinskij en la kunsido de UNO proponis, ke la Organizacio de Unuiĝintaj Nacioj aprobu rezolucion, kiu malpermesu la fabrikadon kaj uzadon de atomarmiloj, kaj proponis plu, ke ĉiuj kvin grandpotencoj, kiuj estas konstantaj membroj de la Porsekureca Komitato, malaltigu la militistan budĝeton je unu triono en kadro de sia armiligita forto. La proponon de la soveta reprezentanto aprobis ĉiuj, kiuj deziras la pacon. Precipe plenĝoje akceptis la proponon ĉiuj virinoj kaj patrinoj de la mondo, kiuj dum la militoj devas suferi ĉiam plej multe. Por la internacia federacio de la demokratiaj virinoj, kiu parolas en la nomo de 80 milionoj da virinoj el 51 landoj, fariĝis la propono de Vyŝinskij iniciato por voki al ĉiuj virinoj kaj patrinoj de la mondo, ke tiuj ĉi postulu de la Organizacio de Unuiĝintaj Nacioj, ke la plano de Vyŝinskij estu de UNO kaj aprobita kaj efektivita. La alvoko de la Federacio de l'demokratiaj virinoj havis inter la virinoj de Ĉeĥoslovakio grandan eĥon. Pli ol 2 milionoj da subskriboj de la ĉs. virinoj estis la esprimo de la deziro, ke niaj infanoj, niaj virinoj kaj hejmoj povu vivi en paco. Laborantaj virinoj de Boskovice al siaj subskriboj aldonis la jenan alvokon: „Ni simplaj virinoj kaj patrinoj, kiuj per peza laboro konstruas kaj subtenas la ekzistadon de niaj hejmoj, el nia tuta koro deziras, ke estu konservita la paco por la patrinoj kaj infanoj en la tuta mondo. Vi, kiuj decidas pri la sorto de la mondo bone konsciiĝu, kian respondecon vi portas sur viaj ŝultroj. Ni simplaj virinoj volus diri al vi, ke ne per la atomarmiloj, per la armeoj vi sekurigos la mondon, sed per pli granda peco da pano, per la trankvila laborpovo vi sekurigos la mondon kaj ĝian feliĉan vivon. Ni petas vin en la nomo de la humaneco, forigu la timon promilitan, lasu la mondon trankvile spiri kaj labori". „Tiuj ĉi vortoj meritas, ke ili estu aŭdataj en la tuta mondo", diris la ĉefministro Zápotocký. „Unuavice devus tiujn ĉi vortojn aŭdi tiuj respondeculoj, kiuj en la kunsido de UNO ne helpis al la aprobo de la soveta propono. La vortojn devus aŭdi tiuj, kiuj iniciatas novan militon kaj ne vidas ĝian mizeron kaj ĝian teruron. La konservado de la paco, tio estas, kio hodiaŭ klare diferencigas la tendaron popol-demokratan kaj progreseman kaj socialistan de la reakcia, kapitalista tendaro. La popoldemokrataj ŝtatoj, tendencantaj al la socialismo, bezonas trankvilon kaj pacon. Ili bezonas kreadi novajn valorojn. La kapitalista kaj reakcia mondo volas militon, ĉar milito — detruante valorojn, kaŭzas mizeron kaj mankon al la vastaj popoltavoloj, donas al la kapitalistoj eblon ekspluati la mizeron kaj riĉigi sin senbride". La ĉefprezidento daŭrigis: „En nia popoldemokrata respubliko ni finas forigadon al la ebloj, ke individuo ekspluatu kaj senlabore sin riĉigadu je kosto de l'mizero de l'aliuloj. Ni organizas laboron kaj vokas al la tuta nacio, ke ĝi kreu per pacama laboro novajn valorojn. Kaj nia laboro sukcesas. Sukcese ni finas nian dujaran planon. Ni venkis la katastrofajn sekvojn de la sekego. Singarde, paŝo post paŝo ni pligrandigas la nutraĵ-kvotojn tiel, ke la pliboniĝo restu daŭra. Danke al nia pacama kaj krea laboro ni festas la nunjaran kristnaskon en trankvila kaj en pli bonaj kondiĉoj ol estis la pasinjaraj. Ni klopodos, ke nia kristnasko estu de unu jaro al la alia pli trankvila, pli ĝoja kaj pli riĉa. Ni sukcesos tion fari", finis sian kristnaskan alparolon la prezidanto registara Zápotocký, „kiam ni sukcesos konservi la pacon, kiam ni ĝis ekstremaj limoj evoluigos niajn kreajn kaj laborajn kapablojn. Kaj ni igos, ke la hela stelo de nia renaskiĝinta nacia unueco kaj de la tutnacia laborpenado daŭre lumu super ĉiuj regionoj de nia patrujo, por ke regu por ĉiam en la urboj kaj en la kamparo la paco al la homoj de bona volo!"

● La organizaĵo „Films of the Nations" (Filmoj de nacioj), kies membro estas ankaŭ Ĉeĥoslovakio, distribuas kultur- kaj informfilmojn al usonaj lernejoj kaj aliaj organizaĵoj. En la kunveno de direkcia konsilantaro estis resumita la rezulto de la lastjara laboro, kaj jen montriĝis, ke ambaŭ ĉeĥoslovakaj filmoj „Ĉeĥoslovakio revenas" kaj „La letero el Praha" atingis entute 3.187 prezentojn, kiujn vizitis 372.879 personoj. Krom tio vidis la filmojn 839.000 posedantoj de televizaj aparatoj.

● La laboristoj de la domkonstrua fako kolektis monon por la francaj ministoj, kiuj devis per la striko defendi sian vivonivelon, minacatan per la franca kapitalista sistemo karboprodukta. La laboristoj de la domkonstrua fako en Ĉeĥoslovakio kolektis inter si dekdu milionojn da ĉs. kronoj. Sed ankaŭ la ceteraj entreprenoj en Ĉeĥoslovakio kolektis monon por la franca strikinta ministaro. Jen pruvo, kiel la ĉsl. laboranta popolo komprenas la tutmondan solidarecon de la laborantoj en la tuta mondo. Kiam subtenas sin reciproke la kapitalistoj en la tuta mondo en la batalo kontraŭ la progreso, kontraŭ la socialismo, des pli urĝe estas, ke la laboranta popolo sur la tuta mondo subtenu sin reciproke ĝis la fina venko de l'progreso, de l'socialismo.

● En Praha, en la plej granda halo „Lucerna" la ĉs. biciklistoj arangis tutmondan turniron de bicikla pilkludo, kie la grupo de ĉs. biciklistoj venkis la bonegajn Svisojn 5:1.

Dum la lasta turniro tutmonda en Parizo estis la ĉs. bicikla trupo la dua. Nun en Praha la ĉs. biciklo-duo Sedláček-Daneš sciis venki la bonegajn svisojn biciklistojn. La sukceso de la ĉs. biciklistoj estis des pli granda, ĉar kun Belgio ili ludis senrezulte, nur 5:5. En la belarta bicikla sporto eminentigis Ĉeĥoslovakoj Štěpán—Pokorný, Vaculík kaj la majstrino de CSR Nováková, plue la Svisoj Mollet k. Studer.

● En Slovakio estis ĝis nun konfiskitaj 300.000 hektaroj da arbara tero, el kio ricevis la ŝtataj arbaroj 258.000 hektarojn, komunumoj 8.000, arbarkompanioj kaj kooperativoj 9.000, urboj 2.500 kaj unuopuloj 18 hektarojn. Plue estis konfiskitaj 296.000 hektaroj da kamp-tero. Tiu ĉi tero estis dividita: al ŝtataj bienoj 12.500, al agrikulturaj lernejoj kaj institutoj 4.500, al etkampistoj 72.000, kamplaboristoj 24.000 kaj kooperativoj 16.500 hektaroj.

● En Parizo kunsidis miksita komisiono por praktiki kulturan interkonsenton inter Ĉeĥoslovakio kaj Francio. La ĉeĥoslovaka delegacio gvidita de ĉefambasadoro Dro A. Hofmeister konsistis el la reprezentantoj de ministerioj por eksterlando, informado kaj kulturo, lernejoj, scienco kaj arto. La kunsido okazis en bonkoreca spirito kaj la membroj de la miksita komisiono decidis daŭrigi la kulturajn interrilatojn kaj kunlaboron inter ambaŭ landoj. Plue pritraktis la komisiono plurajn proponojn, koncernantajn kulturfakojn por venonta periodo. Kiel ĉefan el la proponitaj entreprenoj ni citu la ekspozicion de verkoj de franca pentristo Courbet en Praha, Brno kaj Bratislava kaj la ekspozicion de ĉeĥoslovaka popola arto en Parizo. Ambaŭ ekspozicioj okazos printempe 1949.

● En multaj entreprenoj de Ĉeĥoslovakio estas preparataj la tiel nomataj superplanoj, signifantaj rektan partoprenon de la laborularo en ellaboro de la kvinjara plano, koncernanta ĝiajn entreprenojn. En laborejoj de 150 eminentaj entreprenoj estas ellaborotaj superplanoj de laboristoj mem kun helpo de entreprenaj gvidantoj; la superplanoj fariĝos parto de leĝo, kiu difinos la laborplanojn por la jaro 1949. Per tio la kvinjara plano fariĝos multe pli posedaĵo de la laborularo ol estis la dujara plano. La partopreno de laboristoj, majstroj kaj ĉiuj aliaj partoprenontoj je la ellaboro al superplanoj faros fortan bazon, por ke la grandaj taskoj de la ĉeĥoslovaka kvinjara plano sukcesu.

De la 1-a de januaro 1949 estos en ĉiu kvartalo de Praha konstanta kuracista sanitara servo. Tiu ĉi servo deĵoros en la festotagoj kaj nokte. Ĉiunokte deĵoros unu kuracisto de la kvartalo, unu flegistino kaj ŝoforo. La personoj, kiuj uzos la kuracistan servon, ne pagos por tiu ĉi servo al la kuracisto, sed pli poste al la speciala kaso. Sed personoj, kiuj estas asekuritaj, pagos nenion — ĉion pagos la asekura instituto mem. Kiel ni diris, la servo estos dispone al la loĝantaro de Praha ĉiutage kaj ĉiunokte, do ankaŭ dum la festotagoj kaj dimanĉoj. Tiun ĉi aranĝon akceptis la publiko de Praha kun evidenta rekono.

## RADIO PRAHA

Radiostacio Praha elsendas dufoje ĉiutage en Esperanto:

E l s e n d o I.
16.20 de MET sur mallonga ondo 31.41 metroj 9.550 kc, samtempe sur longa ondo 1935 metroj 155 kc 10 kW.

E l s e n d o II.
22.— de MET sur mallonga ondo 49.92 metroj 6.010 kc 30 kW (per 30 kW laboras ambaŭ mallongaj ondoj).

Tiu ĉi horaro estas valida de la 10-a de Oktobro 1948. Krom tio Radio-Praha elsendas dufoje ĉiusemajne t. e. lunde kaj ĵaŭde:

Praha I.
22.50 de MET meza ondo 470.2 metroj 638 kc 120 kW (sendilo Liblice).

**TRIDEKMINUTA PROGRAMO DE VERDA STACIO ESTAS ĈIAM EN LA UNUA LUNDO DE LA MONATO:**

Praha II.
23.— de MET meza ondo 269.5 m 1113 kc 60 kW (sendilo Mělník).

Brno I.
23.— de MET meza ondo 325.4 m 922 kc 100 kW (sendilo Morava).

České Budějovice.
23.— de MET meza ondo 219.6 m 1366 kc 5 kW (Sudbohemia sendilo).

Ostrava.
23.— de MET meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

**Krom tio tiu ĉi stacio elsendas dufoje semajne:**

Ostrava.
Mardo kaj Ĵaŭdo:*)
23.— de MET sur meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

Viajn dezirojn, kritikojn k proponojn sendu al Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-Servo, Praha XII, Stalinova 12.

*) Escepte de la unua mardo en la monato.

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo". Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, prezid. de IES. Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo) Praha, Ĉeĥoslovakio.

KUL